A K T U A L E

Monata informilo de Sovetunia Esperantista Junulara Movado

№ 4 (8) aprilo 1974

La nova etapo de la sockonkurado

SOLIDAREGO VENKIS

Ni ĉiuj deziras plusan kreskon kaj fortiĝon de la movado.La scio de fortaj kaj malfortaj flankoj de la movado,la kompreno de la tendencoj premisas fortigon de la gagado.Ni do bezonas freŝajn informojn,faktojn plenajn.La plej grava kaj plena fonto de tiuj estas la raportoj.Kio koncernas poentojn - ili helpas pli-malpli precize vicigi la klubojn laŭ kontribuoj al la movado.Kiom solidare la klubaj demonstris sian apogon al la principoj kaj ideoj de SEJM?

En januaro raportis nur 25 urboj,laŭvice:Ivanovo,Harkov,Talgar,Tula,Velikije Luki,Ufa,Kujbyŝev,Donsek,Leningrad,Sikktivkar,Tiŝvin,Kaunas,Viljandi,Mosalnickij,Moskvo,Barnaul,Vilnius,Ust-Kamenogorsk,Steritamak,Poltavo,Riga,Klaipeda,Novosibirsk.La lasta forsendis la Raporton Sverdlovsk - la 9-an de marto!Tu,pli bone malfrue, ol neniam - Taŝkent,Kievo kaj Birsk ricevis eĉ ne per poŝtkarto.Ĉu temas pri hazardo?Bedaŭrinde raporto - jen bonega dokumento por la klubo historio!Estis agrable preni la raporton de Riga - ĉiu artikolo estas notita,ĉiu prelego estas aparte registrita,eĉ la prelegintoj estas notitaj ktp.Oni sentas - la laboron tiu ĉi klubo registras dum la tuta jaro.

MEZA KLUBO

Preskaŭ 1000 esperantistoj unuigas SEJM-kluboj.La plej membobreva estas tiu de Klaipeda - 127 membroj (el ili 45 aktivaj).La plej nedestaj grupoj funkcias en Velikije Luki - 4,Donsek kaj Kujbiŝev - - po 9 personoj.Kiel aspektas "meza" SEJM-klubo?

La meza klubo estas 31-membra(el ili 14 aktivaj),inter ili: partianoj - 2,komsomolanoj 13,studentoj - 9,lernantoj - 5,oficistoj - 12,laboristoj - 5.Ĉiu membro almenaŭ unufoje partoprenis E-rekontiĝon,havas po 1 eksterlanda korespondanuko (ĉiu kvara - en Pollando),abonas 1,3 revuojn.

La klubo organizas 4 prelegojn sume al 150 aŭskultantoj,organizis 2 eksterurbajn ekskursojn por la poklubanoj,esperantigis 6 personojn.Sur la libroŝrankoj staras libroj de 88 titoloj,inter kiuj 12 libroj estas nove akiritaj.La klubo havas 2 kolektivajn korespondligojn kun eksterlando.

REJTER

SEJM-klubaj organizis 16 Renkontiĝojn kaj Tendrojn,kiujn partoprenis 820 personoj (krom tiuj el Birsk,Kiev,Liepoja,Tallin,Taŝkent).Plej amase venadis Klaipeda - 107 pers.,Vilnius - 108,Barnaul - 80,Ivanovo - 56,Novosibirsk - 53,Riga - 50.

Ni do ne restis inter kvar muroj.La neesperantista publiko tion scias - aperis 177 publikaĵoj en la sovetaj gazetaro.La leonan porcion prenis tiu distrikto aŭ urbo - 124 (68 artikoloj kaj 56 sciigoj). En la centra ĵurnalo aperis nur "O čeloveke" en "Vokrug sveta",№9,1974 faro de Moskvo kaj sciige "Centras infanoj" en "Izvestija",№256 de 30.IX. 73.faro de Omsk.

Okazis entute 136 prelegoj kun ĉ.5 140 aŭskultintoj.Plej multe prelegis Ivanovo - 24 prel.(677aŭsk.),Riga - 21(949),Omsk - 13(450), Ufa - 10(300),Novosibirsk - 7(133).Estis aŭ koncertoj - entute 19

entaŭ 1690 spektantoj.Ankaŭ ekspozicioj - 15 grandaj (grandeksemplekzaj) kun sume 8.829 vizitintoj kaj 29 etaj(ekzaj).La lastaj vidis ĉ.2.500 personoj.Kurioj,tamen,sukcesis ne multaj - ĉ.15 kun 227 kurafininto j.Esperebla la ĉefa rikolt ado ekzoze printempe.

Mi havis impresion,ke la kluboj apatie rigardas al E-literaturo. Nur 15 klubaj raportis pri la poseda de klubaj bibliotekoj.La plej grandaj kolektaj proviĝas en Klaipeda - 382 tit.,Vilnius - 150, Poltava - 106,Omsk - 70,Ufa - 60,Ĥarkovo - 50.La klubaj abonis 1377 revuojn (el ili Science Revue - 27).Rezervoj estas,ĉar ĉ.200 geklubanoj abonis eĉ ne unu revuon!

KRESTERLANDA

Ĉe ni gastis 99 eksterlandanoj(en Novosibirsk - 34,Ivanovo kaj Leningrad -po 25,Riga - 10,Ĥarkov - 5).Tion ke ni ĝatas ricevi leterojn,sed ne ĝetos skribi nem (la SEJM-anoj korespondas modere),bone ilustris la fakto,ke ni aperigis nur 17 publikaĵojn en eksterlanda gazetaro kaj prezentis nur 1 scii gon al E-radio.

Leteroj ligis nin kun 40 landoj (1076 privataj ligoj minimume - - ne ĉiuj klubaj raportis).

KRESTERLANDA KORESPONDADO

Raportis nur 15 klubaj.Supre - kvanto de ligoj,malsupre - kvanto de landoj.
Barnaul -50/20;Donesk - 42/12;Ĥmelnickij - 58/18;Ivanovo - 41/8; Klaipeda - 463/38;Novosibirsk - 3/3;Omsk - 53/22;Poltava - 16/5; Riga - 99/16;Sterlitamak - 21/4;Tula - 4/3;Ufa - 142/9;Vilnius -14/16; Siktivkar - 1/1;Telgzor - 46/13;Oni korespondas en Eŭropo.Kun Andoro - 1,Aŭstrio - 7,Bulgario - 109,Britujo - 18,Belgio - 7, Ĉeĥoslovakio - 107,Danlando - 9,Finlando - 24,FRG - 25,Francio - 26, GDR - 91,Grekio - 3,Hispanio - 8,Hungario - 145,Italio - 21,Irlando - 1,Islando - 1,Jugoslavio - 33,Nederlando - 12,Norvegio - 7,Pollando - 203,Rumanio - 40,Svislando - 3,Svedio - 10.
En Azio kun Bangladeŝo - 1;Japanio - 15;Mongolio - 8;Turkio - 2; Vjetnamio - 24;
En Afriko kun Angolo - 2;Sudafriko - 2.
En Ameriko kun Argentino - 6;Brazilio - 11;Kanado - 8;Kubo - 25; Meksiko - 2,Usono - 24;Urugvajo - 2.
Aŭstralio - 9;Novzelando - 1.(Entute 1076/40).
Plej multe da korespondantaj ligoj havas la E-klubo en Klaipeda(463 privataj en 38 landoj kaj 24 kolektivaj en 11 landoj).Ne ve,estas ankoraŭ klubaj,kie membroj ne korespondas (sed kiaĵ tion?!),ekz.Ĥarkovo, Sverdlovsk...Interalie,registri la korespondligojn ne estas malfacile.Preparu tabelon (vidu malsupre),kaj dum kelkaj klubkunvenoj proponu al la samklubanoj noti la ligojn.Cio.Rapide kaj facile!

N	Nomo	landoj k ligoj					u	sume
		Bulgario	Finlando	GDR	Italio	Japanio	Kubo	ligoj landoj
1	———	2	—	—	1	1	—	4/3
2	———	1	1	3	—	2	1	7/3
Islando		3	1	4	1	2	1	12/6

* * *

Vi ĝuu konatiĝis kun iuj faktoj el la Raportoj.Certe,vi provos ilin digesti kaj eltiri vivajn proprajn konkludojn.Tamen jam nun estas klare - ni faris ne malmulton,sed <u>nur parton</u> de tio kion ni kapeblas.Obstinon!

La Sekretario de SEJM V.Šilas (Vilnius)

S O S !
(Pri tendaraj laboroj)

Malgrau la detala priskribo de la tenderaj laboroj en "Aktuale" N-ro 4(6) kaj scitigo pri la tempo de SEJT-XVI (19-29/VIII)ĝis nun neniu E-aktivulo scitigis al ni,kiun tenderan laboron li preferus fari.Ni apelacias al la konscienco de klubestroj:kun viaj geklubanoj relegu "Tenderajn laborojn" kaj elektu ĉu por ĉiu persono ĉu por la klubo certa(j)n taskojn.Alikaze,kiu organizos la tenderon?Ĉian scitigu al ni eufiĉe rapide.

Prezidanto de SEJM A.Gončarov (Barnaul)

Historio de SEJM - zorgo de ĉiu!

Dum la lasta SEJM-Konferenco ne estis fondita historia fako de SEJM pro manko de deziranteoj gvidi ĝi foken.Tamen SEJM havas jam siajn historiojn,kaj ekupiĝi pri kolektado kaj kompilado de la historiaj materialoj ni devmas.

Kiu el ni povas diri,kiom da renkontiĝoj,entute okazis en nia lando?(tenas pri junularaj renkontiĝoj)Ĉi estas sufiĉe malfacila demando.Ja ne ĉiu renkontiĝo havas sian numeron kaj ne ĉiu estis planita antaŭe.Ne ĉiu el ni ankaŭ povas respondi alian demandon:kiaj E-organoj okazis eksterlande kun partopreno de sovetaj esperantistoj?Ĝi estas ankaŭ grava demando.

Nun SEJM estas forta organiĝo,kiu okazigas multnombrajn E-erangojn ĉiujjare.Nome pro tio ni devas komenci la kolektadon kaj kompiladon de la materialoj pri l'historio por la estonto.

Ni ne sukcesis trovi respondeculon pri l'historio fako de SEJM.Sed ni povas fari alielaini povas dividi la tutan laboron je etaj partoj.Ekzemple,regionaj renkontiĝoj (1 regiono - 1 parto); SEJT-oj - 1 parto,Konferencoj - 1 parto...Pri ĉiu parto okupiĝu unu persono.Li faru la tutan laboron,koncernatan al sia parto, respondecu pri la kolektado,kompilado kaj konservado de la materialoj,kaj poste,kiam la historia fako aperos en SEJM,transdonu materialojn al la gvidanto de la fako.Mi proponas dividi la tutan laboron en jenaj partoj:

Partoj de la fako	Respondecaj (Komitato kaj persono)	
1.SEJM-Konferencoj	SEJM-komitato,	?
2.SEJT-oj	SEJM-komitato,	?
3.InternaciajEsperantaj Renkontiĝoj (IER)	?	?
4.Ukrejniaj Regionaj ER	UESR-komitato,	D.Sibulevskij
5.Okcident-Siberiaj KR	OSKR-komitato,	?
6.Centro-Rusiaj KR	Regiona-komitato,	T.Loskutova
7.Cebeltaj KR	Regiona-komitato,	?
8.Volgo-Uralaj KR	RKVU-komitato,	?
9.Diversaj interurbaj KR	Urboj-partoprenantoj	
10.Pioniraj E-tenderoj	SEJM-komitatano pri lernejaj aferoj	
11.E-renkontiĝo de naturamikoj	?	?

La materialojn pri Ukrainiaj KR kompilados mi.Laŭ interkonsento la materialojn pri renkontiĝoj de CR regiono kolektados T.Loskutova. Kaj la aliajn materialojn?Necesas ke dum la plej proksimaj kunsidoj la regionaj komitatoj elektu respondecan personon por tiu celo.Aŭ eni povas fari alielaini:la materialojn pri ajna renkontiĝo kolektu tiuj esperantistoj,kiuj ĝin organizis (la mastroj).

Fine necesas solvi,kio apartenas al "materialoj".Laŭ mia opinio tio estas diversaj dokumentoj (protokoloj,aliĝiloj,programoj,adresaroj,decidoj) kaj fotoj,kompilitoj kaj surgluitaj en albumoj.Ekzemple,estas tre bona albumo pri SEJT-XII en Baŝkirio fatita de ufanoj.

Estas dezirinde pli poste aperigi en "Aktuale" la liston de la respondeculoj pri kolektado de tiuj aŭ aliaj materialoj.Esperantistoj,

haventaj iujn materialojn pri tiu aŭ alia E-arangxo,havus eblecon sendi ilin laŭ la listo.

Mi esperas,ke ĉi artikolo vekos alisjn esperantistojn iel helpi (almenaŭ per konsilo) al la grava laboro.

D.Cibulevskij (Harkov)

Avantaĝoj de intensiva instruado

Ni malgxxxkonti pri la ekfunkcio de nova instrûsistemo ĉe ni en Harkovo.Ni lanĉvice dufoje I971-72,I972-73 gvidis elementan kurson laŭ delonge aprobita ĉe niaj lokaj esperantistoj sistemo.

Ni aplikis la lernolibron de Semjonova kaj Tetorin:ni okupiĝis ĉiudimanĉe po 3 horoj kaj pasis la kurson dum 10 lecionoj. La rezultoj ripetiĝas:sin enskribas en la grupon 36-40 personoj - finas 8-10.En septembro ni preparas proksimume 10 anoncojn kun tre modesta teksto:"Domo de scienciatoj anoncas enskribiĝon al 3monataj kursoj de Esperanto.La kursoj estas senpagaj."Tiujn ĉi anoncaĵojn ni pendigas en la vestiblo] de superaj lernejoj(en 3-4 lokoj)kaj en tiuj de projektaj institutoj.Unufoje ni provis allogi laboristojn pere de anoncoj en la laboristo klubojo,sed vane.

En la difinita tempo al ni venas homoj por sin enskribi.Kutime ilia kvanto estas 100-120.La plimulton konsistigas studentoj. Ni dividas ĉi kvanton en du grupojn kaj komencas en la unua dimanĉo de oktobro.Pro multaj,ol ĉiuj konataj kaŭzoj poiomete la grupoj maldensiĝas.Ekzemplojn plenumas ĉirkaŭ IO personoj,restas en la movado 0-2.

La ĉefaj mankoj de la aplikata sistemo al mi prezentiĝas jene:

1.La sistemo de instruado ne devigas ilin al streĉa laboro,kaj dum la ekstersalditoria tempo oni kutime nenion faras.

2.La materialo de IO lecionoj tute ne sufiĉas por komenci kompreni,des pli paroli.

3.Ne kutimiĝinte al serioza studado ili tuj post la fino de la elementa kurso sen tro bedaŭro (pri kio bedaŭri?)lasas la movadon.

Por modifi ĉi priskribitan malefikan sistemon en I973-74 studjaro ni faris jenojn:dum la unua okupiĝo inter ĉiuj 100 enskribiĝintaj kursanoj ni anoncis apartan akcepton en eksperimentan grupon.Ni avertis,ke en la grupo oni devos insiste laborâ,trapasi 28 lecionojn dum 14 okupiĝoj (anstataŭ entaŭaj 10),kaj donis unu semajnan pos la pripensa koncerne de tempoblece kaj deziro. sekvintdimanĉe ni aperigis la volontulojn kaj komencis iliaan "turmentadon".La restaĵo de la kursanoj daŭrigis okupiĝi laŭ la malnova sistemo kun Klimovskij A.L.

Veliĉe mi sukcesis akiri 20 lernolibrojn de Andrzej Pettin "Ĉu vi parolas Esperante?"(Pollando).La materialo de la lernolibro estas moderna,distra.Gravas ke ĉiuj lecionoj konsistas el dialogoj.Laboris ni tiel:la unuan horon mi donis tradukojn de vortoj,ĉar en la libro estas nur Esperanto-pola vortaro,ankaŭ tradukis gramatikaĵojn;la duan horon mi dividadis ilin poparkte.La konsiston de la paroj mi ŝanĝis konstante,por ili ne amikiĝu kaj ne interkonsentu pri nepreparo.La paroj rolis dialogojn prefere sen helpo de la libro.Pro la sontempa parolado ekazis iome bruo, tamen en tolera amplekso.

Sekve,dum ĉiu okupiĝo ĉiu havis eblecon paroli ne malpli ol 30-40 minutojn,kaj por la sukcitado li (ŝi) havis la nomon tiu-pun!

Se kursano ne preparis sin bone hejme,li ne povis esti ies kunlaborantino.Pro tio la neciligentaj unuj fulmrapide malaperis. La pos rsemajnaj taskoj entenis lernadon de I00-I50 vortoj(mi rekomendas sistemon de Podkamner),preparon por rerakonto de lingaj dialogoj.Sed jen estas mirakle!Ken malfacilece de laboro profundigis ilin en Esperanton.Ĉe dum la studonta sesio la kursanoj frekventis tute prepatitaj.Antaŭ la ekzameno mi enkondukis

subekzamenon,kie oni montris scion de 600 vortradikoj (vidu "Esperanto",decembro,1965 j.).La ekzameno okazis en februaro.Gin trapasis 9 personoj.La nombro de finintoj ne elkreskis,sed la kvalito - - jes.La finintoj sufiĉe bone komprenas paroladon,iom povas paroli,ĉiuj kun okupiĝas en la perfektiga grupo.

Resumante mi volas esperti kontenton pri aplikita sistemo.La ĉefaj avantaĝoj - granda parolpraktiko kaj scio de multaj vortoj meritas atenton.

Ju.Lupickij (Ĥarkov)

Kiel kompili "parolantan leteron"?

(Malformita letero al Boris Vasiljeviĉ Anoĥin,Ust-Kamenogorsk)

Kara samideano!

Tre agrable,ke Vi klare komprenas la signifon de teknikaj rimedoj por klubo,instruo kaj eduka laboro inter esperantistoj.La SEJM-estraro ankaŭ subtenas Magnetofonan Servon de SEJM morale kaj materiale.Sed nur ĉiuj (krom Ufa kaj Omsko) komprenas niajn taskojn.Estas aŭdataj voĉoj:

- Ni ne estas ankoraŭ pretaj por permesi al ni tiun luksoon.Atendu ankoraŭ kvin jarojn!

(Interalie,niaj italaj kaj ĉeĥoslovakaj amikoj ankoraŭ antaŭ 15 jaroj komencis vastan interkorespondadon per "Vivantaj leteroj",kiel ili nomas).

Nia fonoteko konsistas el pli ol 130 diversaj sonbendoj;al deziranto ni sendas listojn de niaj "riĉaĵoj".

Hodiaŭ ni,plenumante la mendon de ufanoj(ili deziras pli multe ekscii pri Aŭstralio),sendis "Parolantan leteron"kun la sekventa programo:

1.Enkonduka vorto (gratulo).
2.Aŭstraliaj esperantistoj pri sia lando kaj laboro (K-agado).
3.Kantas septeto "Catalpa" (katalpa).
4.Du kantoj de aŭstraliaj aborigenoj(la ĉanisto "Hindi-Ĉindi" kaj edziĝfesta "Valaka").
5.Kantoj de la insulo Taiti.
6.Poemeto de L.K.Cukanov pri la Babela Turo.
7.Adiaŭaj vortoj.

Recŝpreke B.G.Kolmer sendis sian 15-leciongan K-kurson,kiun ni disvastigos magnetofone.

Al la K-klubo "La Verda Kverko" (Kedainiai,Litovio)ni sendis "PL",konsistantan el:salutvortoj de 7 ninj K-kursanoj,7 anekdotoj kaj 7 K-kantoj.

Ah Moldavio - rakonte pri A.M.Gerb-Voronova kaj belegajn kantojn de ŝi.Ni kompilis "PL" pri geedzoj Borisov-oj el Kolomna kaj pri iliaj sevindaj kantoj.

Vi povas rakonti pri via K-klubo,iom kanti kaj deklami.Tre simple!

Certe,por la kompilo de "PL" estas necese havi du ĵetonojn:1)sentonon de amikeco kaj kameradeco estimo,2)materialajn elspezojn:100-metra sonbendo (tipo IO) kostas 4 rb.Sed "tiuj luksoon" unufoje en jaro ni povas permesi al si.Ĉu ne?

Pasintjare ni sendis dek "PL",sed nuntempe nur ok.Ĉi-jare 17(respondis nur 5 samideanoj).Tia estas nia diligenta kolegaro.Necesas havi ekstraordinaran pacienconSed n i e s p e r u !

fakestro de SEJM pri Magnetofona Servo
A.Rogov (Ĥmelnickij)

Progresantoj kaj regionaj renkontiĝoj

En la lastaj numeroj de "Aktuale" estas tuŝita grava demando pri progresantoj en K-tendaro.Sed mi opinias,ke la problemo estas pli vasta,kaj pro tio devàras pridiskuti la demandon pri la progresantoj en regionaj renkontiĝoj.

En Centro-Rusio regione (kaj en la aliaj ankaŭ) dum jaro okazas

du renkontiĝoj:la printempa kaj aŭtuna.La aŭtunaj renkontiĝoj okazas komence de nova jarcento,la printempaj - inverse - fine de la lernojaro,kaj tial inter ili estas kaj devas esti granda diferenco.

La aŭtunaj renkontiĝoj laŭ mi devas esti renkontiĝoj de aktivularo. Ni ne devas strebi al multnombra renkontiĝo aŭtune,sed devas zorgi,ke ĝi estu aktivelita,laborplena.Gravas loko dum ĝi devas okupi la metodikoj de alloga per E-kursoj kaj rondetoj,la metodikoj de instruado,enterŝanĝo de sperto,detala analizo de pasinta lernojaro kun konkludoj por la nova.Estas klare,ke la progresantoj ne multe povas kontribui tiun renkontiĝon.

La printempaj renkontiĝoj devas fariĝi specialaj porprogresantoj. Plej ofte dum ili novaj geesperantistoj havas la unuan eblecon renkonti multajn geesperantistojn el aliaj urboj,la unuan fojon ili venas en Esperantujon,unuan fojon ili ricevas plenan eblecon reale,praktike ekkoni niajn tradiciojn,kutimojn ktp.La printempa renkontiĝo devas fariĝi entuziasmiga lerneja,por la progresantoj jam sciu,kio ilin atendas en la tendaro.Kaj de tio,kian impreson lasos en la animo de progresanto,dependas,ĉu li (aŭ ĝi) restos en la movado,ĉu veturos poste/en la tendaron,ĉu estos dum la tendaro aktiva partoprenant(in)o,aŭ pasiva spektant(in)o.Estas necesas elsaluti specialan progreson por la printempajrenkontiĝoj,kaj ĉiu klubo aŭ grupo,kiu organizas la renkontiĝon,devas peni plenumi la progreson.Ĉiu klub- aŭ kurs-gvidanto penu venigi ĉiujn kursfinintojn al la printempa renkontiĝo.Mi opinias,ke tio estos utila por nia movado.

K.Tartyŝev (Kirov)

Skizoj de la vivo de Ufa Esperanto-klubo

En la fino de 1975 jaro nia klubo fariĝis aĝa 5 jarojn,kaj septembre ni komencis nian laboron,preparante nin al tiu ĉi jubileo.

Tuj post SEJT-XV en respublikaj ĵurnaloj aperis multnombraj artikoletoj pri la tendaro,pri "Renkontiĝo de naturamikoj" kaj BSKR-4.Dum aŭgusto-septembro en la respublika junulara ĵurnalo "Leninec" aperis 15 lecionoj de Esperanto,verkitaj de Boris Kolker.Poste estis ricevitaj multaj leteroj kun la plenumita ekzamena tasko.La geklubanoj komune kontrolis ĉiujn laborojn (pli ol 80). La posedantoj de 5 plej bonaj ekzamenaj laboroj ricevis kajton veturi en la tendaron,ankaŭ 10 personoj estis premitaj per esperantaj libroj kaj revuoj.Dum la jaro 1975-74 entute funkcilis 6 rondetoj por komencantoj kaj unu por progresantoj.Ĉiun lastan ni organizis la unuan fojon.Ĝis nun du rondetoj jam sukcese plenumis ekzamenojn.La rondeto ĉe la Respublika Biblioteko,gvidata de M.Gilinskij kaj tiu de B.Kolker ĉe la scienca esplora instituto "Baŝneftegeofizika".

Kvin geufanoj partoprenis RKVU-8 apud Miass.Tuj post ĝia fino en respublikaj gazetoj aperis artikoloj de k-doj A.Aleksandrov kaj A.Levrinoviĉ.Fiel ni venis el nia festo,kiu okazis la 25-an de novembro en la kafejo "Lernoje".Tre agrablaj rememoroj restis post tiu vespero.Post la solenado ni defrigis nian laboron,klopodante atingi kontakton kun Baŝkira respublika Pakomitato.Tamen,nun estas ankoraŭ frue paroli pri iaj konkretaj rezultoj.

Dum la vintro,kiam estis bona (kaj eĉ malbona) vetero,ni faris ekskursetojn en apudurbaj arbaroj.

Nun estas jam finverŝita la esperanta lernolibro de B.Kolker,en la klubo oni planis por aprilo-majo "Lernejon de E-movado",konsistonte el serio de prelegoj.Antaŭnelonge okazis raŭda elsendo pri nia klubo kaj pri Esperanto (parolis M.Gilinskij).

23-24-an de marto,en Salavat pasis renkontiĝo de esperanto-klubaj de Salavat,Ufa,Sterlitamak.Ĝin partoprenis 7 geufanoj.

Salavatanoj organizis interesan paraŭtobusan ekskurson tra la urbo,poste estis komuna kunveno de Salavata E-klubo kaj de gastoj el Ufa kaj Sterlitamak.Fine estis agrabla vespero en la restoracio "Ural".Dekvatage ni edisdis la salavatajn esperantistojn.La ripoztagoj pasis,kaj ni denove estas en Ufa por labori plu.

Baldaŭ devas esti ekzamenoj en la E-rondetoj.
Jen tiel vivas niaj geklubanoj,senpacience atendante esperantan nomeron.

A.Lavrinoviĉ (Ufo)

"Kuzo-73" - ĉu vi aŭdis?

Konsiderante la nomon de nia bulteno "Aktuale",ŝajnas,ke paroli pri tio,kio okazis antaŭ pasintjaro,ne indas,ĉar tio jam perdis sian aktualecon;sed tamen jes,ĉar tiu unika kaj originala tradicia renkontiĝo ne restu nekonata,neaŭdita (krom KKK pri ĝi nenie estis skribite),mi volas iom rakonti ankaŭ pri tiu E-renkontiĝo.Des pli ke ĝi estas specifa renkontiĝo,poezia renkontiĝo.Ĝi estas aranĝata jam kelkjare laŭvice,sed ĝi ankoraŭ ne akiris "civitenecon" de populara renkontiĝo,ne akcentis publikan akcepton (eble pro tio,ke ĝi estis malmulte reklamita).

De la tradicia aŭtuna poezia E-renkontiĝo pasintjare okazis la 5-7 de oktobro apud Pavilnis (Apuĉvilnius),en la pitoreskaj kaj ravaj ĉirkaŭaĵoj ĉe la rivero Vilnele - la unuan foŝon tiel proksime de nia ĉefurbo.Jam la 5-en de Oktobro penttagmeze sur altan montpleton surgrimpis unuaj tendumentoj por aterigi tendojn kaj pasigi en tiu ĉi vere poezia loko tri tagnoktojn.Inter la unuaj dominis junecanoj,sed ankaŭ jam venis kelkaj gastoj,verŝajne la plej fidelaj poeziamantoj.Vere Stasco,ĉiam akompanata de kelkaj knabinoj, travagis multe da kilometroj kaj abunde ŝvitis,ĝis li elektis la plej taŭgan kaj puran lokan por la tritaga tendareto.Entute el la renkontiĝo venis 38 esperantistoj,el ili mastroj - 16,Kaunas - 7, Vilkaviŝkis - 2,Klaipeda - 2,Kapsukas - 1 kaj eĉ unu "eksterlandano" M.Rybakov el Kolomna.Abunde venis novaj esperantistoj (eĉ 15) el jus kreita klubo "Aŭroro" en la elektromekanika teknikumo de Vilnius.

Ni devas nur bedaŭri,ke,malgraŭ informil-invitoj estis nenditaj el multaj lokoj,gastoj venis ne tro multaj.Unu el la atributoj de la tendareto estis "eterna" fajro ĉe la tendoj,aterigitaj en duonrondon.Ankaŭ de la uniformo ĝis forno de la tendaro pri ĉeesto de esperantistoj montris standardon,pendigita sur metita teren natura arkobranĉo.Kvankam tendaren de la fervojstacio direktis verdaj montriloj,tamen ne ĉiuj sukcesis rekte trafi la celon kaj devis vagadi tre l'arbaro sur bordo de la rivero Vilnele kun pezaĵ sakoj surŝultre.

La ĉefa"najlo" de la programo estis poezia konkurso laŭ la temoj:1"Ho,mia kor',ne batu maltrankvile"../L.L.Zamenhof/
2"En sun'aŭtuna arboj nemas eron"../Leopold Stoff/
La partoprenintoj de la konkurso povis reciti originalaĵojn,tradukitaĵojn (kiel siajn,tiel fremdajn).La precipaĵoj de la konkurso:ĝin partopreni oni havis rajton ankaŭ foreste,t.e.nendante iun poezinaĵon,originalan aŭ tradukitan.Laŭ la decido de la tre atentema jurikomisiono-dekduka,gvidita de la aŭtoro de tiuj ĉi linioj,kaj kiun eniris la gvidantino de la novfondita E-klubo "Aŭroro" E.Brunevičiene kaj Klaipedano V.Mileŝius,la unuan premion gajnis A.Skiergelas - junecano, pro la recito,la duan - kaunasano A.Vaitkus,pro la recito de la memverkita dumtendare verso.La lastan,kvankam solidnaĝa,ĉiam estas inter junularoj,neniam maljunigantoj,la trian premion gajnis ankaŭ junecanino G.Grabaĵite ankaŭ pro la recito.Apartaj premioj pro originalaj versoj kaj elekto de melodio (ankaŭ verkitaj dumtendare)kun ilia plenumo estis aljuĝitaj al M.Rybakov kaj la kunuloj V.Šilas.Apartaj premioj estis forsenditaj por la forestaj partoprenintoj de la konkurso,kiuj bedaŭrinde ne abundis,eble pro tio,ke tiaspeca entreprenо estis organizita unuafoje.Ili estas E.Brunŝteja el Kiŝinjov kaj instruistino el Panevežjis R.Miliuviene,konsekvenca kaj sindona esperantistino.Ambaŭ sendis originalajn verkojn.Bedaŭrinde,ke neniu elpeŝis kun proŝaĵoj.

Tagordon ampleksis sportkonkursoj,ĉiumatena gimnastiko,lernado de novaj E-kantoj sub akompano de V.Šilas.Bonan impreson ankaŭ faris la

De la redakcio

Por ĉiuj jam estas kutime ekzisto de "Aktuale",sed verĝajne ĉiuj rimarkis,ke foj'de foje la bultseno malfruemas.Mi golas malkovri la plej gravan kaŭzon de similaj okazoj kaj alvoki al la forigo de tiu.

Nia redakcio ricevas multajn artikolojn.Ili estas redaktataj kaj poste tajpataj.Jen ĝuste ĉi en tio "estas enfosita la hundo".Tute ne ĉiu havas eblecon tajpi siajn artikolojn,do oni skribas simple mane.

Kaj gekamaradoj,ĉu vi scias,kiom da tempo estas elspezata de la redaktoro kaj tajpistino por kompreni ebundantajn neklarajn skribmanierojn?Do,la redakcio havas eufiĉe facilo plenumeblan peton: se vi deziras ricevadi la bultenon ĝustatempe kaj trovi sur la paĝoj de tiu viajn artikolojn senerare tajpitajn,bonvolu skribi per laŭeble pli klara skribmaniero.

La tajpistino de "Aktuale" Kateli Stolbun
(Barnaul)

** ** **

Materialojn por "Aktuale" sendu laŭ la adreso:
Barnaul-656099,s.k.11,Esperanto-klubo.

redaktis V.Kbelj,
tajpis K.Stolbun

vizitita Puŝkin-muzeo en la eŭtikva kunestrino de la lime de Vilnius, kie sintempe loĝis la avo de mem A.Puŝkin.La Ĝeestintoj enkaŭ havis eblecon viziti la stacion de naturesmikoj.

Ĉiuj partoprenintoj verŝajne porlonge memoros la tiel nomatan noktan marŝon laŭ "diablo" vojo al la ŝlosejo "Aprico",instalita en naturaj kondiĉoj.Tie oni ĝuis vermegajn ŝaŭlikojn rekte el sub fajro kaj malvarman trinkaĵon.Kantoj,dancoj,improvizado,ludoj,skeĉoj, anekdotoj,rakontoj ĉe komuna tablo verkis treege aparte atmosferon.

Kiel premioj por la gajninto de la poezikonkurso estis distribuitaj poezi-kolektoj,eldonitaj eksterlande,verkoj de Sandor Petefi, Julian Tuwim,revuoj kaj aliaj E-literaturo.

Eĉ nokta fronto ne malhelpis regi al bona humoro inter la tendaranoj.Tie ĉi ja kolektiĝis verdatelanoj.A.Veittum enkoraŭ kajme por la ronkontiĝo verkis vortojn por la nova kanto pri nia renkontiĝo, trovis konvenan melodion kaj sendis ĝin al nia klubo - jen kia influo de bona renkontiĝo,kia inspiro.Pro tio estis tre malfacile lasi la montpinton la lastan tagon kaj denove eniri kvaŭsĉ el fabelo,kvazaŭ el alia mondo la kutiman ĉiutagan vivon.Esperantistoj,emploksiĝu per novaj fortoj por nia komuna celo - Esperanto.dis la revido en "Suno"-74!

Prezidanto de "Junece" P.Egorov (Vilnius)